

EN ĈI TIU NUMERO / DANS CE NUMÉRO :

Instrui Esperanton.....	1
Post FESTO en Tarno.....	2
Partenariat réussi.....	2
Vermokompostado.....	3
L'agenda du Krokodil'.....	4

"La Krokodil'" est le bulletin d'information du Centre Culturel Espéranto de Toulouse, association pour la promotion et l'enseignement de l'espéranto. Si vous souhaitez contribuer au "Krokodil'", merci de nous faire parvenir vos articles et photos. Tous les articles du "Krokodil'" sont mis en ligne sur le blog, où il est également possible de laisser des commentaires.

Visitez notre blog "La Krokodil'"
<http://lakrokodil.wordpress.com/>



ESPERANTO-KULTUR-CENTRO DE TULUZO
Centre Culturel Espéranto de Toulouse
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 - 06 31 68 00 26
E-mail : esperanto.toulouse@free.fr
Site : www.esperanto.toulouse.free.fr

Instrui Esperanton: nova seminario la 27an kaj 28an de novembro

Post la sukcesa seminario pri esperanto-instruado, organizita en pasinta aprilo de EKC helpe de Tuluzaj Esperantistaj Fervojistoj kaj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ni tuj ekpensis, ke tian seminarion ni devos reokazigi. Pri tiu intenco ni jam parolis en la raporto pri la seminario, kiun vi povis legi en La Krokodil'. Jen plipreciziĝas la afero: ni povas anonci al vi, ke nova seminario okazos la semajnofinon de la 27a kaj 28a de novembro.



Kiel la unua, tiu seminario estas titolita "Instrui Esperanton: metodika seminaro". Ĝi dediĉiĝas unuavice al tiuj dezirantaj instrui Esperanton sed ne havantaj teorion aŭ praktikan bazon. La seminario donos al vi rapidan superrigardon al la diversaj metodoj de lingvoinstruado, kaj kelkajn bazajn teknikojn.

Refoje, gvidos tiun seminarion nia amiko Xosé, kiu vojaĝos de Katalunio ĝis Tuluzo. Xosé instruas Esperanton, kaj estas trejnanto pri esperanto-instruado en la kadro de la programo "Flugiloj de Malfacila Vento", kies celo estas plialtigi la nivelon de esperanto-instruado en nia movado, speciale tiun de la junaj esperantistoj.

Por tiu dua okazo, cele al pli granda kvalito de la seminario, ni decidis limigi la nombron de partoprenantoj je 10 personoj. Cetere, ni prioritatigos tiujn, kiuj jam instruas Esperanton aŭ havas projekton instrui.

Kristof

Post FESTO, postrenkontiĝo en Tarno

La jenan tekston verkis la grupo de Lavour nelonge post FESTO, la junula renkontiĝo kiu disvolviĝis en Donneville ĉi somere. Ni ne povis aperigi ĝin en la pasinta Krokodil' ĉar ĝi alvenis bedaŭrinde iom tro malfrue. (La redaktanto de la Krokodil'.)

Post FESTO, kelkaj eksterlandanoj daŭrigis la renkontiĝon en Tarno ĉe diversaj esperantistoj ĝis la mardo.

Vendrede vespere, dek tri personoj manĝis ĉe Annie kaj Daniel. La Rusoj volis gustumi francajn vinojn (ankaŭ la « pastison ») kaj fromaĝojn.

Sabate matenon, ĉiu familio rendezvous en la bazaro de Lavour. La esperantistoj rigardis kun intereso la diversajn proponitajn komercaĵojn. Post kelkaj aĉetaĵoj, ni vizitis la urbon (katedralon, malnovan kvartalon...) Postagmeze,

la Rusoj preparis tipikajn rusajn manĝaĵojn, aliaj masaĝis visaĝojn per silkaj penikoj. Vespere, ni renkontiĝis ĉe Francis kaj Brigitte okaze de granda stangrostita ŝafaĵo. La cirko « Pistil » prezentis belegan spektaklon. Tre bona etoso: muziko, rusaj dancoj, interrenkontiĝo...

Dimanĉe, ni ĉiuj vizitis la « Sidobron ». Ni piediris tra la famaj granitaj ŝtonegoj. Ni piknikis apud bela lago kaj poste vizitis la « ŝtonegan riveron ». Lena, Dimitri kaj Ĵenja lasis in en Mazamet por pet veturi ĝis Moskvo! Ili alvenis tien kvin tagojn poste. Dimanĉon vespere, la temperaturo estis tre varma (38 gradoj!). Ni banis nin kune en la lago de "La Cougotte" antaŭ ol manĝi ĉe Joëlle kaj Georges.

Lunde, la svedo kaj la lasta rusino fortrajnis. Restis nur Fabien, kiu devigis nin progresi esperante. Tre riĉiga sperto, nepre refarenda!



Stage et partenariat réussi à Boo-Silhen (Haute-Pyrénées)

organisé par le Groupe Espérantiste Toulousain des Cheminots

Ce fut une semaine radieuse tant par les conditions météo dans un cadre très agréable que par l'ambiance des participants pour ce stage où les différents niveaux ont été respectés. Grâce à Jeanine, Josée (groupe espérantiste des cheminots autour de leur président André), Christophe (groupe espérantiste EKC Toulouse) nous avons encore progressé au cours de matinées studieuses méritant l'après-midi : des détente ludiques, des repas conviviaux, des promenades sportives et culturelles. Apprécié à l'unanimité, ce style de stage loin de la ville est à renouveler pour parler toujours plus en espéranto et réunir des espérantistes de différentes régions !



Jackie

Kiel fabriki vermokompoŝtujon?

La principo

La vermokompoŝtado ebligas redukti kaj valorigi siajn rubojn per nova uzo en la tero de siaj ĝardeno aŭ florpotoj. Malkiel la tradicia kompoŝtado, la vermokompoŝtado ebligas diserigi siajn rubojn eĉ en apartamento – ekzemple, metante la kompoŝtujon en sian kelon. Efektive, la vermoj amas la lokojn mallumajn, nek tro sekajn nek tro malsekajn, kun konstanta temperaturo (inter 13 kaj 25°C). La vermokompoŝtado estas multe pli rapida ol la klasika.



Tiu proceso ebligas fabriki du produktojn tre interesajn por via tero:

- la vermokompoŝto, tre nutriga kaj riĉa sterko.
- la kompoŝtosuko (aŭ kompoŝtoteo), kiu same utilas kiel sterko. Oni uzas ĝin dissolvita por nutri la plantojn (1 volumo de kompoŝtosuko en 10 volumoj de akvo).

La vermojn necesajn vi povas aĉeti en fakvendejoj, sed ankaŭ eblas ricevi kelkajn de iu, kiu jam havas vermokompoŝtujon (ili reproduktas sin sufiĉe rapide). Ili nutras sin per organikaj ruboj: ĝardenruboj, ŝeloj, tesakoj, kafofiltriloj, gazetpapero, fruktoj kaj legomoj. Oni prefere evitu citrusojn, poreojn kaj cepojn, kiujn ili ne ŝatas.

La materialo

Fabriki sian propran vermokompoŝtujon tre facilas kaj estas preskaŭ senkoste. Por fabriki trietaĝan kompoŝtujon, vi bezonos kvar polistirenajn skatolojn kaj unu kovrilon kutime uzatajn por transporti fiŝaĵojn. La fiŝvendistoj ĝenerale konsentas fordoni al unu sia kliento materialon kiun ili kutime forĵetas. Notindas, ke fabrikante vian kompoŝtujon vi kontribuas reuzi malekologian materialon.

Tri skatoloj kuŝos unu sur la aliaj, kaj la kovrilo supre. Por eviti envenon de insektoj kaj muŝetoj, la skatoloj devos esti ĝustigitaj tiel, ke ne estu interspaco.

Unu metodo

Ekzistas diversaj metodoj por fabriki vermokompoŝtujon: tiu priskribita ĉi tie estas nur unu ebla inter diversaj aliaj.

Kutime, la polistirenaj skatoloj kiun oni trovas en fiŝvendejoj havas truojn ĉe la anguloj de la fundo. La truojn de ĉiuj skatoloj vi devas ŝtopi. Por tion fari, vi uzos la kvaran skatolon! Eltranĉu el ĝi polistirenajn pecojn, iomete pli grandajn ol la ŝtopendaj truoj, kaj enŝovu tiujn pecojn en ilin.

La unua skatolo estas tiu, en kiu kolektiĝos la kompoŝtosuko. Nun, vi devas prepari la du aliajn, kiuj gastigos la vermojn kaj ricevos la kompoŝton.

Prenu ŝraŭbilon, distruu per ĝi la fundon de ambaŭ skatoloj. Tiuj truoj utilis por ellasi likvaĵon (la kompoŝtosuko) kaj ebligi al la vermoj transiri de unu skatolo al alia.

Poste, vi faru la kovrilon. Prenu kudrilon, kaj distruu la kovrilon en multaj lokoj. Tiuj truoj enlasos la aeron por ke la vermoj povu spiri. La truoj ne estu tiel grandaj, ke la vermoj povu foriri!



L'Agenda du Kroko'



Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : www.esperanto.toulouse.free.fr.
Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Christine (Kiki) au 06.31.68.00.26 ou 05.61.62.39.48, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr

NOVEMBRE - NOVEMBRO

Mar. 09 : début d'un premier cours express

Horaire : De 18h30 à 20h30 tous les mardis

Lieu : L'ENSEEIH

Objectifs : s'initier en 6 semaines à l'espéranto.

Sam. 13 : forum des associations de solidarité internationale - Stand

Dans le cadre de la Semaine de la Solidarité Internationale

Objectif : informer sur la langue internationale espéranto et notre association

Lieu: place du capitole

Horaire: de 10h à 17h

Organisé par le Collectif Régional des Organisations de Solidarité Internationale - Midi-Pyrénées

Mar. 16 : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses, à côté de la Poste de Compans-Cafarelli

Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.

Prix: payer ses consommations

Organisé par Bilingue

Sam. 27 et Dim. 28 : séminaire de méthodologie

Animé par Xosé Condé dans le cadre des séminaires "flugiloj de malfacila vento"

Lieu: local des cheminots à Surcouf

Objectifs : se familiariser avec les différentes méthodes d'enseignement de l'espéranto.

Mar. 30 : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus (voir plus haut)

Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.

Prix: payer ses consommations

Organisé par Bilingue

DECEMBRE - DECEMBRO

Mer. 01 et Jeu. 02 : Forum Associatif de l'Université du Mirail - Stand

Objectif : informer sur la langue internationale espéranto et notre association

Lieu: Patio central, Université du Mirail

Horaire: de 10h à 17h

Un Forum associatif pour informer les nouveaux étudiants du Mirail de la richesse associative et culturelle toulousaine.

Organisé par l' AFEV

BESOIN DE MONDE POUR TENIR LE STAND (Contactez Marion : 06 87 64 75 84)

Jeu. 02 : Atelier d'auto-apprentissage de l'espéranto

Objectif : découvrir les outils disponibles sur internet pour apprendre l'espéranto, et comment les utiliser

Lieu: Le Clic-Cool Café, 5 rue de la digue (près du Théâtre de la Digue)

Horaire: de 18h30 à 20h30

Coorganisé par EKC et le Clic-Cool Café.



Jeu. 02 : Soirée film sous-titré en espéranto

Objectif : Découvrir des films ou documentaires du monde entier
Premier film : le documentaire tchèque "Český sen"

Lieu: Baton à Palabres

Horaire: de 20h à 22h

Tarif : 2 euros, une boisson sans alcool offerte

Contactez: Marion au 06 87 64 75 84

Dim. 12 : ZAM'FESTO 2010

Le rendez-vous annuel des espérantistes de la région autour d'un repas et d'un spectacle

Horaires:

10h A.G. de la fédération Esperanto Midi-Pyrénées Saint-Agne

A partir de 11h30 Apéritif et repas

A partir de 14h30 : Foire des associations de la région

A partir de 15 : Théâtre avec le TTT "La grandioza Kongreso" nouvelle version.

15h30 : Concert de Gijom (Guillaume Nénuphar)

Lieu: salle des cheminots à Saint-Agne, 65, rue St Roch 31400 Toulouse (Stade Henri Greard)

Mar. 14 : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus (voir plus haut)

Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.

Prix: payer ses consommations

Organisé par Bilingue

